ISAE

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO - FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang ★ Nr. 10 Oktober 1952

Wir grüßen *das kommende Land!*

Von Alfred G. Walther, Bielefeld

Es ist mir immer wieder eine große Freude, die Tiefe und den Wert unserer Arbeit um Esperanto von den „Großen" unserer Tage anerkannt, ja unterstützt zu wissen. So trifft man denn auch hin und wieder in Büchern bekannter Persönlichkeiten Gedanken über eine Weltsprache, die einem das Herz froh machen können und gleichzeitig Argumente darstellen, die Waffen zu sein vermögen im Ringen für unsere Idee.

Heute möchte ich Ihnen Gottfried Traub vorstellen, d. h. besonders denen, die ihn noch nicht kennen. Als Verfasser der Bücher „Aus suchender Seele" und „Gott und Welt" (erschienen in Berlin-Schöneberg und Stuttgart) hat er sich einen Namen gemacht. Ein feinsinniger, offener Mann, bringt er in diesen Büchern in formvollendeter Aussprache tiefste sittliche und religiöse Gedanken verschiedenster Art zum Ausdruck.

In seinem Buch „Gott und Welt" nun findet sich unter vielen anderen ein Kapitel, überschrieben „Weltsprache".

Dort heißt es:

> „Die vernünftige Welt ist als ein großes, unsterbliches Individuum zu betrachten, das unaufhaltsam das Notwendige bewirkt." Schelling.

„Ich weiß noch genau, wie mir meine Mutter die unheimliche Sage vom Turmbau in Babel erzählte, welche die ersten Blätter der Bibel berichten. Daß die Menschen einen so großen Plan verwirklichen und eine Stadt gründen wollten für alle Völker, und einen Turm, der bis an den Himmel reicht, konnte ich nicht als Schlechtigkeit empfinden. Eher verstand ich etwas von der Eifersucht Jehovas, der nicht will, daß die Menschen ihm gleich sein sollen, und in Blitz und Sturm herabfährt und die Sprachen der Menschen verwirrt, damit sie sich nicht mehr über einheitliche große Ziele verständigen können. Als ich später diese alten Geschichten wieder las, lernte ich ihre geschichtliche Entstehung begreifen. Der Wirrwarr der Dutzende von Sprachen, die auf dem Weltmarkt der babylonischen Großstadt gesprochen wurden, hatte für den ungewohnten Zuschauer etwas Beängstigendes. Wie war es doch gekommen, fragte sich das harmlos fromme Gemüt, daß diese Menschen, die ja alle von einem Menschenpaar abstammen, mit solchen Schwierigkeiten zu kämpfen haben, um einige Stücke Geld zu wechseln und ein paar Sandalen kaufen zu können? In der Stadt, in der Millionen umgesetzt wurden, erschien kaum noch etwas unmöglich. Aber, antwortet der stille Denker, es soll eben kein gewaltiger menschlicher Plan ausgeführt werden. Der Mensch soll nicht den Allmächtigen spielen wollen. Er soll nicht mit seiner Hand an den Himmel reichen. Türme alter Weltstädte blieben in halber Höhe, Dome des Mittelalters grüßen uns heute unvollendet; sie sind alle nur ein Zeichen für den festen Willen Gottes, den Stolz der Menschen zu rügen, wenn sie ewige Werke schaffen wollen.

An all diese dunkeln Empfindungen wurde ich erinnert, als ich von den neuesten Bemühungen um eine einheitliche Weltsprache las. Es handelt sich dabei nicht um eine Spielerei, sondern um ernste Zukunft. Wie überall, so geht auch hier der Handel voran und ebnet Berge und füllt die Täler, um geraden Weg zu machen. Wer reisen will, muß heute schon eine der Weltsprachen kennen. Aber sie haben immer ihre bestimmten Grenzen. Wenn es gelingen würde, allen vorwärtsstrebenden Völkern einige kurze Verständigungsmittel in die Hand zu geben, die West und Ost verbänden? Die Muttersprache mit ihrem süßen heimischen Laut wird nicht verdrängt. Sie wird erst recht zum trauten Eigenbesitz. Aber die Macht des Menschen steigt, je größer der Kreis ist, auf den er wirken kann. Haben wir uns schon klargemacht, daß wir die Kinder der Masse an die Scholle binden, weil wir sie keine fremde Sprache lehren; die Grenzen des Landes sind für sie Mauern, nicht unübersteigliche, aber schwerer zu nehmen. Wenn das alles mit der schreitenden Zeit anders würde, wie würde sich das Weltbild ändern. Alle Verständigung geht von außen nach innen; das Fremdartige schwindet, je mehr wir uns im Verständnis nähern. Es sind ungeahnte Entwicklungen, die sich an solch einfache technische Hilfsmittel, wie die einer Welthandelssprache, anschließen. Träume wachen wieder auf, man sieht fernes Land, die Erde rückt zusammen. Wir wissen heute, daß jene alte Angst vor der Götter Neid keine frommen Wirkungen mehr auslöst. Der Himmel müßte sich freuen, wenn die Erde sich verstünde."

Soweit Gottlieb Traub. Was soll ich seinen Ausführungen hinzu-

Nova „Esperanto-Vojo"

La plimulto de niaj legantoj eble jam scias, ke en Glinde-Hamburg ekzistas de ne tre longa tempo „Esperanto-Weg". Ni ĝojas ke ni hodiaŭ povas publikigi bildon pri la fikso de la koncerna tabulo kun ĝia samtempa ornamo fare de la entuziasma dommastrino s-ino Koch en Glinde per flagetoj Germana, Esperanta, Eŭropa kaj Holstejna. Unua eksterlanda gasto de la vojo estis s-ano Frank Halls el Melburno, Aŭstralio, en akompano de la Kolonjaj ges-anoj Kreischer, Wingen kaj Wolff, survoje al Oslo. La komunumestro, s-ro Rübner, forte subtenis la instigon de la sudetgarmana s-ano Bruno Gahler pri „Esperanto-Weg", kaj la tuta estraro de Glinde decidis ĝin unuanime.

LA 37a UNIVERSALA EN OSLO

Oratora Konkurso

En la oratora konkurso por gejunuloj oni donis premiojn al tri partoprenantoj kiuj bone parolis antaŭ granda ĉeestantaro. La juĝkomisiono, konsistanta el d-ro Lapenna (prez.), s-ino Kennedy, kaj s-ro Morariu, facile elektis la gajnanton de la unua premio, Nicola Minnaja el Romo, al kiu ili aljuĝis 38 poentojn el eblaj 40. Estis ege malfacile por ili aljuĝi la duan kaj trian premiojn, sed fine ili donis al f-ino Inga-Maj Adamson el Göteborg 32 poentojn kaj al f-ino Hella Lanka el Hamburg 30.

La gajnintoj ĉiuj ricevos diplomon kaj libropremion, kaj krome oni dividis inter ili premion de 100 svisaj frankoj, donacon de la Svisa Esperanto-Societo. Tiun sumon la Komisiono aljuĝis jene: Unua premio — 50 fr.; dua premio 30 fr. — tria premio 20 fr.

La prezidanto gratulis ĉiujn partoprenantojn pro la tre alta nivelo de la paroladoj.

Kunveno da ISAE

Ĉeestis 15 personoj el 10 diversaj landoj, inter ili el Argentino kaj el Japanujo.

Prezidis la kunvenon s-ro Carl Stöp-Bowitz, laŭ invito de la prezidanto de ISAE, prof. d-ro Frechet de la Universitato en Parizo, kiu estis malhelpita ĉeesti la kongreson.

Jenajn temojn oni pritraktis:

Propagando por kaj informado pri Esperanto en sciencaj rondoj okazu pli grandskale ol ĝis nun. Diversaj rimedoj estis indikataj.

La sekcio por **terminologiaj vortaroj** de ISAE kaj la koncernaj instancoj de la akademio de Esperanto kunlaboros, evoluante tiumaniere la ĝustan labormetodon kaj diferencigon por la diversaj sciencaj sektoroj.

La diferenco inter la enhavo de **la vorto „scienco"** en la diversaj landoj evidentigas la neceson precizigi per kompara studo la terenon por havigi ĝustan nocio-indikon pere de la Internacia Lingvo.

Estas dezirinde sammaniere esplori la terenon de la fakaj esprimoj en la Universitata medio. Tiucele a) utilas kontrakto kun UNESKO-instancoj por scii ĉu jam io estas farita por la temo, kaj b) utilas eventuale informo pri la helpo, kiun povas doni la Internacia Lingvo en la nomigado de tiuj diversaj nocioj kaj faktoj.

Kelkaj sufiksoj necesaj en la lingvo-evoluo en zoologio, biologio, matematiko kaj kemio estis pridiskutataj. Aranĝoj estos farataj por daŭrigi la specialan kontakton pri tiu temo.

Aŭdienco

La prezidanto de UEA, s-ro Ernfrid Malmgren, kaj la prezidanto de LKK s-ro C. Stöp-Bowitz, estis ĵaŭdon tagmeze aŭdience ĉe lia moŝto Kronprinco Olav.

Infankunveno

Deksep infanoj el ses landoj kaj multaj plenkreskuloj ĉeestis tiun ĉi kunvenon, kies popularaj programpunktoj estis konversacio, kanto, ludoj kaj ĉokoladmanĝado (dank' al kelkaj donacintoj). La inicianto, d-ro F. Szilágyi, kaj Einar Dahl gvidis la pli grandan parton de la kunveno. Klariĝis, ke ĉiuj infanoj komprenas Esperanton kaj la plimulto eĉ bone parolas ĝin. Prof. Sirk rakontis fabelon, s-ino Haudebine prezentis alian fabelon kaj francan infandancon, s-ino Mabesoone kaj f-ino Hellinx instruis nederlandan ĉendancon al la juna generacio, kiu rimarkeble estis kontenta pri la aranĝo.

La eksperimento ŝajnas esti bonŝanca.

Horeto da poezio

Per ĉi tiu programero s-ro Stuttard pruvis teorion pri la manko de aprezo de la Esperanta poezio, bazante siajn konkludojn sur la ideo, ke la poeziemo de la homoj komencis degeneri kun la apero de la presilo.

La parolanto aparte emfazis la fakton ke la poezion oni devas aŭdi, ke legado ne sufiĉas. Tiucele s-ro Stuttard legis serion da poemoj originalaj, ĉerpitaj el diversaj fontoj, kaj kun komentoj pri la enhavo aŭ rilate al la ĝenerala evoluo de la Esperanta literaturo. La pecoj uzitaj estis el la verkaroj de Haugen, Miĥalski, Hohlov, Baghy, Privat, Schwartz, Clark, Dinwoodie, Kalocsay kaj Zamenhof.

Aŭdantaro el proksimume 200 kongresanoj donis esperon pri pli vasta realigo de la ideo krei festivalon de poezio en la kadro de la universalaj kongresoj.

Belartaj konkursoj

Unu el la elstaraj programeroj dum ĉiu UK estas la belartaj konkursoj. Ĉi-jare la partoprenantoj estis tre multnombraj: 43 personoj el 18 landoj sendis 109 konkursajojn.

La nivelo de la verkoj rimarkeble altiĝis dum la lastaj kongresoj, kaj s-ro Szilágyi esprimis sian konvinkon ke iam niaj belartaj konkursoj fariĝos literatura juvelo, kian la cetera publiko alie ne povos trovi en la mondo. Unuafoje ni havis veran dramon inter la originalaĵoj, kio estas granda paŝo antaŭen al supernacia kulturo.

La unua premio por originala poezio estis aljuĝata al la poemo: Al malfruaj solenontoj de la Tago de Rememoro (de John Francis, Skotlando), la dua premio al: Meditado (de Jiři Kořinek, Ĉeĥoslovakujo). Post pianludo de „La kanto de Dovregubbens Hall" estis deklamataj ĉi tiuj tri poemoj de s-ro Minnaja resp. s-ino Colliander. Verva estis la aplaŭdo kiu postsekvis. Post informo pri ĉiuj premiitoj, s-ro Szilágyi eluzis la okazon prezenti al la esperantista publiko la ĉeestantajn verkistojn kiujn la plej multaj konas nur de la legado sed ne persone. Kelkaj el ili citis mallongan verkaĵon; precipe s-ro Musella rikoltis tondran aplaŭdon pro sia recitaĵo.

Jen informo pri la ceteraj gajnintoj: la unuan premion por tradukita poemo ricevis s-ro William Auld, Skotlando, la duan s-ro Roger Bernard, Francujo, la trian s-ro J. Dinwoodie, Skotlando. Por originalaj rakontoj la juĝantaro donis nur unu premion, nome al s-ro D. Richardson, Usono, por la novelo „Rosario" kiun legis s-ro J. H. Rosbach. Por tradukita prozo la unua premio estis aljuĝata al s-ro E. Lane, Anglujo, la dua al Societo Esperantista en Mulhouse (Francujo). Kulmino de la aranĝo estis la prezentado de originala dramo, verkita de f-ino Daly, Anglujo: Taso da teo. Skandinaviaj gesamideanoj recite legis la rolojn, ĉar ne estis eble prezenti la verkon surscene. Tamen ili donis bonegan impreson pri la verketo kaj ne ĉies okuloj restis sekaj ... — La dua premio de la sama branĉo estis donata al f-ino Marjorie Boulton, Anglujo, la tria al s-ro Ewart Clark, Anglujo. En la branĉo tradukita dramo estis disdonata nur unu premio, nome al s-ro G. Rittersbach, Germanujo.

Krom la premioj, la juĝantaro honore aŭ merite menciis kelkajn konkursajojn. La solena transdono de la premioj okazis dum la ferma kunsido.

---

setzen, ohne ihr kräftiges Zeugnis zu schwächen! Diese Worte aus dem Munde eines Nicht-Esperantisten sagen viel, ja, uns im Jahre 1952 weitaus mehr als dem Menschen des Jahres 1913, in welchem das Buch herausgegeben wurde.

So bauen viele an unserem Hause. Laßt auch uns Steine herantragen, damit unser Projekt Wirklichkeit werde. **Wir grüßen das kommende Land: Esperantujo!**

Dua Ĝenerala Kunveno

S-ro Malmgren malfermis la kunsidon kaj legis diversajn salutleterojn.

Prof. Lapenna raportis pri la dua sekcio, kiu akceptis rezolucion al UNESCO, aŭdis diversajn raportojn kaj akceptis rekomendojn por progresigi Esperanton en scienco kaj tekniko.

S-ro D. Kennedy raportis pri la laboro de la unua sekcio. Temo estis Esperanto en la grupoj. La sekcio donis konsilojn pri programtemoj kaj instruado, kaj ke grupoj en diversaj landoj interŝanĝu programojn.

Por la tria sekcio raportis s-ro J. H. Rosbach. Inter aliaj aferoj ĝi diskutis pri la starpunkto de diversaj

gravaj internaciaj organizaĵoj rilate al Esperanto kaj akceptis konformajn rezoluciojn. Tiu sekcio konstatis ankaŭ gravan mankon de mallongaj teatraĵoj kaj faris diversajn rekomendojn por forigi tion.

S-ro Petit raportis pri la laboro de la kvara sekcio, kies temo estis Esperanto en turismo kaj komerco. Ĝi rekomendis ke estontaj LKK organizu vizitojn al gravaj industriaj entreprenoj: ke estu planoj de urboj en la UEA-jarlibro: ke estu listo de lokaj Esperantistoj en restoracioj: ke oni starigu Esperantan Turisman Servon.

Poste sekvis raportoj de diversaj fakaj asocioj kaj ĝenerala diskutado.

Centro de Esploroj kaj Dokumentado

La kunlaborantoj kunvenis vendredon tagmeze. La prezidanto, prof. d-ro Ivo Lapenna, en sia enkonduko akcentis, ke oni bone distingu inter du aferoj: la Informa Fako de UEA unuflanke kaj la Centro de Esploroj kaj Dokumentado aliflanke, kvankam ambaŭ estas gvidataj de la sama persono. La unua estas informa institucio por la disvastigo de Esperanto, la dua estas scienca institucio, kiu per sciencaj argumentoj influas sciencajn mediojn.

En ĝenerala diskuto estis pritraktataj sugestoj pri informado, aperintaj en la julia numero de „Esperanto". La aŭtunajn kampanjojn oni en pluraj landoj jam fiksis; tamen la sugestoj estas bonege utiligeblaj kiam ajn.

Pri akcentado de la facileco de Esperanto ĉiuj samopinias, ke estas reale diri, ke por ellerni la Internacian Lingvon oni bezonas dekonon ĝis kvinonon de la tempo bezonata por ellerni nacian lingvon. Oni rekomendas, aperigi similajn sugestojn ankaŭ en venontaj jaroj, eble en formo de broŝureto.

Pri elekto de komuna devizo, oni rekomendas, agi laŭ la ekzemplo de la sveda movado, kiu bonege utiligis sian devizon. Ĝi elektis: „Se ĉiuj homoj nun ellernus Esperanton, la popoloj de la mondo interkompreniĝus post du jaroj." Eble, por aliaj landoj aŭ por certaj medioj pli bone taŭgas unu el la dek devizoj, aperintaj en la julia numero de „Esperanto". Oni utiligu ilin laŭ la cirkonstancoj.

Por informado de ne-esperantistaj kongresoj, la landaj asocioj utiligu la cirkuleran leteron de la Informa Fako de UEA, laŭ decido de la komitato en la Pariza kongreso. La tradukojn en angla kaj franca lingvoj la Centro volonte liveros al la landaj asocioj.

La Kongresa Balo

Kulmino de la kongresa semajno fariĝis la balo en la Urba Domo. Tiu pompa konstruaĵo donis vere solenan kadron al nia modeste sed tamen elegante vestita kongresanaro, kiu plene estimis la grandaniman inviton de la urbestro. Aŭskultante belan muzikon la kongresanoj regalis sin per buterpanoj kun diversaj delikataĵoj. Ne mankis trink- kaj fumaĵoj. Iom pli poste la kongreso ekdancis: sur la ornamita marmoro sin turnis la danceemuloj el 35 landoj, dum la ceteraj ĉirkaŭvagis tra la flankaj salonoj aŭ rigardis de supre la multekoloran moviĝantan bildon. La urbestro mem Esperantlingve bonvenigis la kongreson per varmaj vortoj. La Prezidanto de UEA, s-ro Malmgren, dankis nome de la ĉeestantoj denove al la urbestro pro la afablega gastigo, nomante la Urbo-domon „Palaco", laŭda atributo kiu vere ne estas troigo. — Dum la vespero alvenis danktelegramo de la reĝo pro la saluto, kiun la kongreso sendis al li okaze de lia 80a naskiĝdatreveno. — Je la unua horo ĉiuj bedaŭris la neatenditan finon.

Solena fermo

En plena aŭlo, post kelkaj enkondukaj vortoj, prezidanto Malmgren proponis ke la kongreso sendu al la urbestro de Oslo esprimon de kora danko pro la grandioza akcepto en la Urbodomo. Poste li donis resuman raporton pri la laboro farita dum la Kongreso.

La premion en la Internacia Konkurso inter la landaj asocioj gajnis Brazilo, kie la regantaj instancoj havas tre simpatian sintenon al nia lingvo.

S-ro Oliver donis mallongan raporton pri pluraj eroj en la Estrara raporto, kaj klarigis pri la nuna laborsistemo de la komisionoj. Li sciigis ke la oficiala gazeto „Esperanto" ampleksos 48 paĝojn en la novembra numero, en kiu estos unu el la prelegoj donitaj en la Somera Universitato. Similajn ampleksajn numerojn oni eldonos laŭeble dum sekvontaj monatoj, se venos sufiĉe granda nombro da aliĝintoj por UEA.

Oni sciigis pri la elekto de s-ro Jung kiel honora membro de UEA.

ISU, kun tre interesaj temoj, estis multvizitata, kaj la Kongreso esprimis koran dankon al la rektoro, d-ro Reiersøl, al ĉiuj prelegistoj, kaj precipe al la aranĝanto, prof. d-ro Lapenna.

D-ro Szilágyi informis pri la rezultoj de la diversaj konkursoj en la Belarta Konkurso.

Reprezentanto de Urugvajo transdonis la salutojn kaj bondezirojn de la Urugvaja Ministerio al la Kongreso en Oslo.

S-ro Malmgren laŭdis kaj dankis la bonegan preparlaboron de la LKK, sub la sperta gvidado de s-ro C. Støp-Bowitz. Post siaj penoj dum la jaro ili ja meritas la brilan sukceson, kiun atingis la kongreso. La prezidanto ankaŭ kore dankis al la diversaj servoj — gazetara, poŝta, ktp. — kiuj ĉiuj tre bone funkciis. Specialan meriton havis la grava kaj streĉa laboro de la KKS, s-ro Stuttard, al kiu la ĉeestantaro donis fortan aplaŭdon.

Parolis poste s-ro Støp-Bowitz, la LKK-prezidanto de la 37a UK. Li tre ĝojis ke la kongreso sukcesis, sed petis pardonon pro la nekongresa vetero, vere de li ne kontrolebla. Li tre kore dankis al siaj multaj kunlaborantoj en Oslo, en Norvegujo kaj eĉ en eksterlando, kiuj dum la jaro dediĉis sin al la preparlaboro.

S-ro Karterud tutkore salutis nome

Der Leser hat das Wort

zu „Der Hörer hat das Wort"

Ein großer Teil der Esperantisten unter den Hörern des Nordwestdeutschen Rundfunks hat am 14. September 1952 um 14.30 Uhr die Sendung unter obigem Titel gehört, denn sie behandelte „unser" Thema: Welt(hilfs)sprache — Esperanto. Statt eines besonderen Kommentars dazu wollen wir zwei Leserstimmen hören, die uns zugegangen sind.

M. S. aus D. schreibt:

„Jus mi aŭskultis... Estis plena sukceso por Esperanto. Mi ja estis atendinta, ke la plejmulto rekomendos enkonduki komunan lingvon internacian, sed mi estis surprizita, ke oni preskaŭ senescepte malaprobis la naciajn lingvojn inkluzive de la angla. Je la fino de la dissendaĵo la parolantoj citis la opiniojn de anoj de „naturalistische Sprachen" kaj menciis la lingvojn Occidental, Latino sine flexione k. a. Mi devas konfesi, ke mi ne scias, kia estas „naturalisma lingvo". Ĉu vi ne povus publikigi artikolon pri tio? Mi ofte diskutas kun konatoj pri Esperanto kaj tial estas grave almenaŭ maldetale koni la konkurantajn lingvojn, ankaŭ se ili ne estas danĝero por Esperanto. Cetere la ĉefparolanto aŭ la redaktoro mem de la dissendaĵo diris, ke li estas „kovrita" de esperantistaj skribaĵoj. Ĉu tio ne estas motivo ree postuli Esperanto-dissendojn en la programoj de la germanaj stacioj?

B. K. aus K. schreibt:

...Diese Sendung zeigte in erfreulicher Weise, daß das Publikum in seiner großen Mehrheit bereits heute schon einsieht,

a) daß eine Nationalsprache als Welt(hilfs)sprache nicht in Betracht kommt,

b) daß von den sogenannten „künstlichen" Sprachen wohl nur Esperanto diese Rolle spielen wird.

Meines Erachtens war es sehr wirkungsvoll, daß gleich zu Beginn die wertvolle Voraussicht des Philosophen Fr. Nietzsche auf eine Weltsprache in nicht allzu ferner Zukunft und die ebenso wertvolle Zustimmungsäußerung von Professor Dr. Vossler zu Esperanto gegeben wurden.

Die Anführung einer Ido-Meinung und einer weiteren eines Verfechters einer sogenannten „naturalistischen" Sprache hätte vielleicht etwas Verwirrung stiften können; aber allmählich weiß doch fast jedermann, daß Ido bereits wieder so gut wie verschwunden ist und daß die naturalistischen Sprachen an Schwierigkeit in der Erlernung kaum den Natursprachen nachstehen. Man käme also nur vom Regen in die Traufe.

Zur richtigen Beurteilung der Hörermeinungen wäre es nötig gewesen, jeweils die Anzahl der Einsendungen gegen eine Welt(hilfs)sprache, für Esperanto und für ein anderes System zu erfahren. Das hätte vielleicht den Wert der Stimmen für Esperanto noch mehr unterstrichen. *

de la blindaj esperantistoj, kies kongreso okazis samtempe, kaj ankaŭ bone sukcesis. La blinduloj jam aranĝis la protestantan Diservon, ankaŭ parton de la distra vespero, por montri sian dankon al la movado.

D-ro Borovečki, prezidanto de la 38a UK en Zagreb, salutis kaj kore invitis al sia urbo.

Fine, s-ro Kennedy esprimis la dankon de la kongresanoj al nia estimata kaj multŝatata prezidanto, s-ro E. Malmgren. La 37a finiĝis laŭ la kutima maniero per la kantado de la „Espero".

La 37a voĉdonis la jenajn rezoluciojn:

„Universala Kongreso de Esperanto apelacias al la oficialaj instancoj, naciaj kaj internaciaj, serioze kaj sen teoria antaŭjuĝo studi la praktikan solvon de la problemo pri Lingvo Internacia, kiun prezentas la lingvo Esperanto.

Ni asertas ke Esperanto, pro simplaj gramatiko kaj konstruo facile lernebla, bone taŭgas por ĉiaj lingvaj bezonoj de la internacia vivo.

Tiun nian aserton ni submetas al ĝenerala esplorado. Nur per observado pri la funkcio de Esperanto en kongresoj kaj konferencoj, kiel ankaŭ per scienca esploro de la aperinta literaturo, la problemo povas esti prijuĝata.

Universala Kongreso de Esperanto komisias al la Universala Esperanto-Asocio ĉiel akceli la studojn pri la funkcio de Esperanto, invitante objektivajn observantojn al ĉiuj estontaj kongresoj kaj konferencoj."

La Unua Sekcio rekomendas:

1. al la gepatroj, ke ek de la plej fruaj jaroj la gepatroj kiuj havas junajn infanojn, instruu al ili ne nur la gepatran lingvon, sed ankaŭ Esperanton.

2. a) al la grupoj interŝanĝon de tutaj gruppro gramoj por vesperoj kun grupoj en aliaj landoj.

b) plej ofte pritrakti nian Esperantan literaturon, precipe la nacian literaturon de aliaj popoloj, por kiuj ekzistas materialo en niaj antologioj.

c) kunveni en la grupoj almenaŭ unufoje dumsemajne.

La Dua Sekcio (Scienco kaj Tekniko), kies laborojn partoprenis 61 reprezentantoj de sciencaj kaj fakaj-teknikaj internaciaj aŭ naciaj Esperanto-organizoj kaj individuaj sciencistoj,

konsiderante

ke jam estas atingitaj rimarkindaj rezultoj en la praktika aplikado de la Internacia Lingvo Esperanto por la celoj de la scienco, kio precipe rilatas al: (1) publikigo de originalaj kaj tradukaj sciencaj verkoj; (2) aperigo de sciencaj kaj fakaj revuoj; (3) eldonado de resumoj en Esperanto al nacilingvaj verkoj kaj disertacioj; (4) kreo de 107 fakvortaroj por 44 diversaj branĉoj de la scienco kaj tekniko; (5) popularigo de la sciencaj akirajoj per prelegoj, aparte en la kadroj de Internacia Somera Universitato; (6) interŝanĝado de spertoj kaj faciligo de sciencaj esploroj kaj personaj kontaktoj inter la sciencistoj per internacie organizataj konferencoj, kongresoj, vojaĝoj, korespondado,

alvokas

UNESKO-n, kies fundamenta celo estas progresigi la internacian kunlaboradon per edukado, scienco kaj kulturo, kaj kies baza programo plurfoje akcentas la lingvajn malfacilaĵojn, objektive esplori la rezultojn, kiuj ĝis nun estas atingitaj sur tiuj kampoj, kaj la eblecoj pri plua, multe pli ampleksa utiligo de tiu lingvo por la celoj de UNESKO.

La Tria Sekcio (Esperanto en la internaciaj intelektaj interŝanĝoj):

a) Al la prezidanto de la Unuiĝo Esperantista Franca en Parizo pri sendo de abstinulo-esperantisto al Internacia kongreso kontraŭ alkoholismo en Parizo.

b) Al la Skolta Administra Centro en Londono.

La 37-a UK de Esperanto en Oslo, kun pli ol 1600 partoprenantoj el 33 landoj, parolantaj unu lingvon kaj komprenantaj unu la alian per tiu lingvo, salutas la Skoltan Administran Centron kaj respekte prezentas proponon, ke la problemo de universala helplingvo estu denove konsiderata, rilate al Esperanto.

De 1935 la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. Esperanto ne plu estas nura projekto inter aliaj projektoj; ĝiaj progresoj sur ĉiuj kampoj pli kaj pli firmiĝis.

Ni do petas, ke ĉiuj skoltaj sekcioj en ĉiuj landoj estu konsultataj pri enkonduko de Esperanto kiel helplingvo ankaŭ inter geskoltoj. Ni estas certaj, ke lernado de la internacia lingvo ne estas perdo de tempo, sed forta grandigo de kulturo, kaj ke la lingvo ege faciligas interkompreniĝon kaj kunfratiĝon de ĉiuj popoloj — kio estas ja la preciza celo de la skolta movado.

c) Propono de tagordo por la sekcio dum la UK en Zagreb.

1. Listo de beletristikaj verkoj tradukindaj Esperanten.
2. Funkciigo de Esperanta teatra servo.
3. Starigo de kongresa katedro por plibonigi la Esperantan prononcon.
4. Proponoj pri tagordo por la Tria Sekcio en la 39-a UK.
5. Diversaĵoj.

Komerco

La Kvara Sekcio rekomendas 1. propagandi en la diversaj landoj, por ke ĉiuj gravaj firmoj aliĝu al Esperantista Komerca Ĉambro, pagonte al ĝi, kun membreco kiel MJ al UEA, kotizon jaran de £ 1 ĝis £ 5, laŭ la servoj deziataj.

2. Kompense, kun tiu deviga aliĝo kiel MJ, UEA presigu en la jarlibro la nomojn kaj adresojn de la firmoj kiuj estas membroj de la Esperantista Komerca Ĉambro.

La sekcio komisias la Prezidanton rilati al s-ro Jung, kun deziro ke Heroldo fariĝu la oficiala gazeto de Eŭropa Turismo kaj de la Esperanta Komerca Ĉambro.

Turismo

La Kvara Sekcio postulas: 1. de la estraro de UEA, ke la LKK-oj organizu vizitojn al industriaj, komercaj kaj aliaj gravaj entreprenoj okaze de la UK; 2. ke la estraro de UEA ekzamenu la eblecon aldoni al la jarlibro geografiajn kartojn de la landoj kaj gravaj urboj, kun steletoj kie estas delegitoj. 3. En grandaj urboj, la jarlibro menciu post la nomo de la delegito la ejon, sufiĉe proksime al la centro, kie estos trovebla listo de la lokaj esperantistoj, kun ties adresoj. 4. La sekcio starigis novan fakan asocion, EUROPA TURISMO, kies statutoj estas aldonataj. 5. La sekcio deziresprimas ke oni zorgu, ke la oficialaj turismo-oficejoj ricevu regule, en sufiĉa kvanto, faldfoliojn en Esperanto pri turismo.

Statuto

I. **EUROPA TURISMO** celas la organizon de karavanoj kaj turismaj aranĝoj tra Eŭropo pere de la internacia lingvo.

II. La kotizo al ET estas £ 0-10-0 jare, kaj enkalkulas por tri kvaronoj la kotizon al UEA kiel MJ kaj por unu kvarono la kotizon al la asocio mem. En okazo de interkonsento kun landaj asocioj plia kotizo por la landa asocio povas esti aldonata.

III. Gi aliĝos al UEA kiel faka asocio kaj al EKS kiel turisma fako.

IV. La komitato de ET konsistas:

1. el la diversnaciaj karavan-aranĝantoj, kiuj akceptis tiun statuton,
2. el kvin membroj elektitaj de la ĉiujara ĝenerala kunveno. Gi elektas inter siaj membroj estraron, konsistantan el 5 personoj: prezidanto, 3 vicprezidantoj, 1 ĝeneralsekretario-kasisto.

V. ET havas turismajn delegitojn en la plej gravaj urboj de Eŭropo. Ili ricevas makleron de la karavan-aranĝantoj por la servoj, laŭ interkonsento.

VI. Ĝenerala kunveno de la asocio okazos ĉiujare, okaze de la UK en la kadro de la IVa sekcio de la kongreso. Gi ricevas raporton de la estraro, aprobas la kontojn kaj prenas ĉiujn decidojn por la bona funkcio de la asocio.

Rezolucio al la mondkonsilantaro por bonfarto de la blinduloj.

La 22a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta en Oslo, 2—9 aŭgusto 1952, en kiu partoprenis reprezentantoj el 10 landoj, starigis: **Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj.** La ĉefa celo de tiu mondorganizaĵo estas disvastigo de la internacia helplingvo Esperanto inter la blinduloj. Por akiri tiun celon, oni petas la Mondkonsilantaron por bonfarto de la blinduloj, ke ĝi kiel eble plej intime kunlaboru kun LIBE. La unua kondiĉo por tia kunlaborado estu ke la Mondkonsilantaro akceptu Esperanton kiel korespondan lingvon. Cetere LIBE petas la apogon de la Mondkonsilantaro por enkonduki Esperanton ĉe por-blindulaj lernejoj kaj organizaĵoj.

Rezolucio al la respondeculoj de la blinduledukado en ĉiuj landoj.

Estas nepre necese kaj urĝe, ke oni enkonduku kiel eble plej baldaŭ la internacian lingvon Esperanto en ĉiujn por-blindulajn lernejojn tra la tuta mondo, kiel devigan instrufakon.

La ĉi-supra rezolucio havas la nuran celon intensigi kaj plifaciligi ĉu la interrilatojn ĉu la interŝanĝadon de spertoj inter la tutmonda blindularo, por akceli kiel eble plej taŭge la progresadon de la blindulafero.

Sur tiu ĉi kampo nun, dank' al Esperanto, tutmonda neŭtrala lingvo, estas atingebla perfekta tutmonda senpera kunlaboro. Do, ni petas la respondeculojn de la blinduledukado en ĉiuj landoj ke ili klopodu efektivigi tiun ĉi rezolucion.

Prelegeto pri la Vigelandparko

okazis en plenplena salono lundon tagmeze. Kapitano R. Bugge-Paulsen priskribis la diversajn ĉefpartojn de la liber-aeraj skulptaĵoj en la Frogner-parko kaj menciis la skulptejon, kiu enhavas la alian duonon de liaj verkoj. La preleganto citis la kolekton en la Nacia Galerio en Oslo kaj la pejzaĝajn monumentojn en la centro de Oslo. Li ankaŭ priskribis la du ĉefverkojn destinitajn por la parko, sed kiuj ankoraŭ ne estas lokitaj, nome la „Triangulo" kaj la „Gento". Li akcentis la dualismon en la stilo de Vigeland: en la junaĝa epoko lia stilo estis influata de la franca skulptisto Rodin kaj la belga Meunier. En tiu epoko liaj verkoj montras maldikajn, nervozajn, kvazaŭ pentraj-similajn stilon kaj teknikon, dum la pliaĝa epoko montras dikan flegman, pli stiligitan, simpligitan kaj idealigitan stilkoncepton.

*

Kunveno de la Universala Framasona Rondo okazis mardon posttagmeze. Tamen ne estis eble celebri la riton en Esperanto, kiel dum la pasintaj kongresoj, pro la riparoj en la templo en Oslo. Tiel la ĉeestintoj, kiuj venis el multaj landoj, pritraktis la temon de la diverseco de la ritoj en diversaj landoj, kaj la rolon de la esperantista movado en la kadro de la tutmonda framasonaro, kiu rezultis tre kontentige, ĉar ekzistas en la mondo jam tri loĝioj kiuj estas esperantistaj kaj celebras la riton en Esperanto. Oni sendis salutmesaĝon al la prezidanto, s-ro Carl Barthel, kiu ne povis partopreni la kunvenon.

*

Konsiderante, ke relative nur tre malmultaj germanaj esperantistoj povis partopreni la 37an en Oslo kaj dezirante partoprenigi kiel eble plej multajn en la vivo de la kongreso, EP publikigis tute detalan raporton. Espereble ĝi helpis iom efektivigi la intencon de la redakcio.

„Der Leser hat das Wort"

Die Redaktion gibt gern noch weiteren Stimmen Raum, allerdings müßten sie knapp gefaßt sein und sofort eingesandt werden.

Die Anregung von M. S., auf Grund dieser Sendung an die deutschen Sender mit der Bitte um weitere Esperanto-Sendungen heranzutreten, sollte nicht außer acht gelassen werden.

Einen Artikel über „naturalistische" Sprachen wird die EP demnächst zur allgemeinen Orientierung bringen.

ĈU NIA MOVADO STAGNAS?

Dialogo de Maks Federl

La eĥo de nia nova artikola serio ne estis granda ĝis nun — sincere dirite: venis nenia eĥo. Ni esperas, ke la pritraktata temo trovos ankoraŭ la plenan intereson de niaj karaj gelegantoj.

„Bonan vesperon, mia kara!"

„Bonan vesperon ankaŭ al vi! Kiel vi fartas?"

„Mi dankas. Bone mi fartas hodiaŭ, kaj estu bonvena. Jen la hokoj por via ĉapelo. Elektu komfortan seĝon!"

„Multan dankon. Ĉu vi permesas, ke mi fumas cigaredon?"

„Kompreneble. Poste mi prezentos al vi mian specon."

„Nu, mi rigardu. Sed laŭ via sanstato mi povas hodiaŭ larĝe pritrakti miajn ideojn pri la Esperanto-movado."

„Jes, tio estas konvena al mi hodiaŭ. Mi ankaŭ pripensis ĉi tiun aferon. Sed unue vi montru la vojon al la sukceso de Esperanto."

„Dum niaj lastaj du interparoloj mi kvazaŭ desegnis la malbonan staton de nia movado."

„Jes, mi ofte miris pri via pesimismo."

„Cefpunkto de mia ideo estas kunigi ĉiujn eblajn fortojn por aataŭenigi Esperanton en la mondo."

„Bone, sed kiamaniere?"

„Devas esti unu sola centro por la tuta movado kaj ĉefe por la gvidado de la propagando por Esperanto."

„Ni ja havas tian centron. UEA ja kunigas ĉiujn fortojn."

„Jes, vi pravas. Sed UEA estas nur parto de la Esperanto-movado. Ĉiuj aliaj ligoj, asocioj kaj eĉ la faksocietoj devos esti anoj de UEA, kaj sekve tie ankaŭ devos kunflui la tuta mono. Per tia granda sumo oni povos varbi kaj propagandi grandstile por la mondlingvo."

„Sed tio estas ege malfacila afero."

„Mi konscias plene pri la malfacilaĵoj. Jen estas la problemo de la valutoj kaj devisoj, sed helpe de Esperanto oni certe venkos ne nur ĉi tion, sed ankaŭ la aliajn."

„Kaj por kio vi volas uzi ĉi tiun grandan sumon?"

„Ho — la sumo ne povas esti tro alta. Se vi ĉirkaŭrigardas atente, vi rimarkas ke nuntempe oni propagandas por ĉiuspecaj artikloj — kaj oni propagandas plensukcese. Ekzemple por cigared fumado kaj alkoholtrinkado. Ambaŭ havas multajn kontraŭulojn, ĉu ne? Sed rigardu la propagandon kaj ĝian sukceson! Oni varbas per afiŝoj, anoncoj, en filmteatroj, en la Radio, en magazenoj, en la fervojo kaj en aŭtobusoj. Ĉie, kien vi iras, vi renkontas la propagandilojn por ambaŭ ĝuaĵoj. Krome varbas plej multe la varo aĉetita mem."

„Nu, Esperanton oni ja ne povas kompari kun cigaredoj kaj biero."

„Ne, mi ne faras tion, sed komparu la varbmanierojn jen por cigaredoj, jen por Esperanto!"

„Por la unuaj oni tamtamegas, pri Esperanto oni publike nur aŭdas malmulte."

„Guste tion ekkoni mi akcelas. Ankaŭ por Esperanto oni reklamu laŭte kaj daŭre."

„Tio estas malfacila, ĉar Esperanto ne estas ĝuaĵo kiel tabako kaj alkoholo."

„Ne, sed Esperanto estas ilo por ke interkompreniĝu homoj de ĉiuj landaoj — ĉu tio ne valoras la streĉon de ĉiuj fortoj kaj la elspezon de milionoj?"

„Vi pravas, ĉar aliflanke oni ŝparos same multajn milionojn."

„Bonvole rigardu la varbadon por Esperanto. Mi volas ofendi neniun fervoran samideanon, sed la varbado estas plejofte diletanta. Mi mem jam varbis tiel diletante, mi ne hontas konfesi tion. Mi jam tiam havis senton pri tio, sed mi ankaŭ ne povis agi alie. La tuta varbado estas pli aŭ malpli hazarda kaj dependas ĝenerale de unuopulo. Kaj plej ofte estas tiel, ke la volo estas forta kaj fortega, sed la karno — ni diru: la kaso — estas malforta." „Vi estas prava, sed kiel vi volas aliigi tion?"

„Per kelkaj vortoj oni ne povas diri tion. Sed unue mi volas montri grandskale mian planon. La centro — ni diru UEA — devas centrigi la monon kaj devas organizi varbcentron. Presigi okulfrapajn afiŝojn, farigi varbfilmojn montrante la valoron de Esperanto ĉiuflanke, disponigi varbparolistojn ankaŭ ekzotikajn, eble negron, indianon, eskimon aŭ simile, kaj la Esperanto-movado devos posedi propran Radio-stacion."

„Ha, ha! Tio estas utopiaj planoj. Kiel vi volas realigi ilin? Mi eĉ ne kuraĝas pensi pri la monsumo, kiun postulas via plano."

„Hodiaŭ mi ne povas difini la unuopan eron. Kaj mi ankaŭ ne estas financspertulo, sed mi volas instigi al pripensado, planado, kaj kalkulado. Mi estas konvinkita pri la ega malfacileco, sed oni devas serĉi novajn vojojn."

„Mi kredas, ke oni nur ridos. Pripensu, kiom kostas Radio-stacio! Unue la konstruo kaj due la funkciigado. Krome, kiel malfacilega estos sole la akiro de la permeso por Esperanto-Radio-Sendstacio?"

„Ankaŭ pri tio mi pensis. Sed tio estas aferoj duagradaj. Unue devas esti instigoj, planoj — kaj oni trovos realigontojn."

„Mi estas pesimisma."

„Se vi pensas en la ĝisnuna kadro, mi komprenas vian pesimismon. Sed ni nepre devas modernigi niajn varbmetodojn!"

„Mi konsentas, sed ne vidas vojon."

„Estas ja fakto, ke estas tro malmultaj esperantistoj. Tial ni nepre devas varbi inter ĉiuj homoj por akiri kunhelpantojn kaj precipe homojn, kiuj p a r o l a s Esperanton. Ju pli multaj homoj parolos nian lingvon, des pli multe oni atentos ĝin kaj tiam ankaŭ la monrimedoj plimultiĝos."

„Vi estas prava, sed bonvolu daŭrigi!"

„Profesie mi devas multe vojaĝi kaj preskaŭ ĉiusemajne mi iras tra alia urbo kaj renkontas novajn homojn. Sed dum kvar jaroj mi renkontis neniun — Esperantiston. Ĉu mi iris tra la stratoj de Frankfurt aŭ Wiesbaden, ĉu mi vagis tra Kolonjo, ĉu mi vojaĝis trajne, ĉu aŭtomobile. Ankaŭ en mian kontoron venas ĉiutage multaj homoj — sed neniu Esperantisto. Kelkiuj demandas pri mia verda stelo. Sprite parolas pri ruĝa stelo kaj miras pri la signifo de mia insigno. Aliaj montras intereson esperante pri favora negoco. Kelkaj iam lernis Esperanton, sed ĉion forgesis. Sed — kiel dirite — veran Esperantiston mi ne renkontis ĝis nun."

„Tio estas vere interesa sperto. Mi ne povas paroli pri tio, ĉar mi ĉiam vivas en mia mallarĝa mondo ĉi tie."

„Vi certe komprenas, ke ankaŭ pro tiaj kialoj mi venis al la konvinko, ke ni devas multe pli varbi. Kaj la varbado sola ankaŭ ne sufiĉas. Oni ankaŭ devos zorgi, ke la Esperantistoj havu okazon por uzi la lingvon internacie. Per vojaĝoj en aliaj landoj vizite al tieaj samideanoj, per karavanoj kunigantaj diverslandajn homojn por kune vojaĝi ien, kie ili restas por amuzo, refreŝiĝo aŭ eĉ por laboro."

„Certe, ĉio estas bonegaj perspektivoj, sed nur estonteca muziko, kaj sincere mi devas diri, ke mi miras pri viaj kuraĝaj planoj, sed pri realigo mi eĉ ne kuraĝas revi."

„Ankaŭ mi plene konscias pri la malfacilaĵoj — sed oni devas agi! Se vi deziras, mi eĉ pli detale „ŝpinos" antaŭ viaj spiritaj okuloj pri miaj planoj. Kiel ekzemple la centro subtenu la varbadon por Esperanto en unuopaj landoj, kiel oni kolektu la monon pro Radio-stacio — tute ne novaj vojoj tio estas —, sed laŭ mi, oni devas ion entrepreni, por ke nia movado ne stagnu, sed vivu."

„Nu, mi scivolas pri viaj detaloj. Mi provas kompreni vin, sed ne ĉiam konsentas. Ankaŭ ne tute pri via aserto, ke la Esperanto-movado stagnas."

„Mi ne povas devigi vin al tio, sed la kontraŭon vi ankaŭ ne povas pruvi."

„Ne, por tio mi estas tro malhelpita sane. Tamen mi ĝojas pri niaj konversaciaĵoj."

„Do, venontfoje mi detaligos tiun aŭ tiun planon. Kaj nun mi volas ekstari kaj foriri."

„Nu, ne tiel rapidu. Mi tute forgesis proponi al vi cigaredon pro la fluo de la interparolado."

„Tio ne estas grava. Mi deziras al vi ĉion bonan!"

„Dankon! Mi deziras al vi la saman. Fartu bone!"

„Ĝis revido!"

(Daŭrigota)

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netaŭgulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Dekkvara daŭrigo)

Mi bone rimarkis, ke la studentoj tre volonte estus ekŝpinantaj ĝentilan babiladon kun ŝi; ĉar ili ĉiam iris preter ŝi, kaj la kornisto ĉi-kune tusetis kaj ŝovetis nun je sia kravato, nun je sia tripinta ĉapelo. Sed ili ne havis sufiĉan kuraĝon, kaj ankaŭ la knabino ĉiufoje mallevis la okulojn, kiam ili venis pli proksimen al ŝi.

Sed precipe ilin ĝenis la maljuneta sinjoro kun la griza surtuto, kiu nun sidis sur la alia flanko de l' ŝipo kaj kiun ili tuj prenis kiel ekleziulon. Li havis brevieron antaŭ si, en kiu li legis, sed interdume rigardis ofte en la belan pejzaĝon, dum ke la ora rando de la libro kaj la multaj enmetitaj kolorigitaj bildoj de sanktuloj belege fulmis en la matenbrilo. Tamen li ankaŭ rimarkis tre bone, kio okazis sur la ŝipo, kaj baldaŭ ekkonis la birdojn laŭ iliaj plumoj; ĉar daŭris ne longe, tiam li alparolis en latina lingvo unu el la studentoj, post kio ĉiuj tri aliris, deprenis antaŭ li la ĉapelojn kaj ankaŭ latine respondis.

Sed mi dume estis sidiĝinta tute antaŭe sur la pinto de l' ŝipo, lasis gaje pendoli miajn gambojn super la akvo, kaj dum ke la ŝipo tiel forflugis kaj la ondoj sub mi muĝis kaj ŝaŭmis, mi rigardis senĉese en la bluan malproksimon: kiel tie unu turo kaj unu kastelo post la alia elvenis el la verdaĵo de la bordoj, kreskis kaj kreskis kaj fine malantaŭ ni remalaperis. Ke h o d i a ŭ mi do havu flugilojn! mi pensis kaj fine pro malpacienco eltiris mian violonon kaj ripete ludis ĉiujn miajn plej malnovajn muzikaĵojn, kiujn mi estis lerninta ankoraŭ hejme kaj en la kastelo de la bela sinjorino.

Subite iu elmalantaŭe frapis sur mian ŝultron. Estis la eklezia sinjoro, kiu dume estis formetinta sian libron kaj jam iom da tempo estis aŭskultinta min.

„Ej", li diris al mi ridante, „ej, ej, sinjoro muzikmajstro, Li forgesas manĝi kaj trinki."

Poste li postulis, ke mi enpoŝigu mian violonon, por preni kun li manĝeton, kaj kondukis min al malgranda, agrabla laŭbo, kiu el junaj betuloj kaj abietoj estis starigita de la ŝipistoj en la mezo de l' ŝipo. Tien li estis metiginta tablon, kaj mi, la studentoj kaj eĉ la juna knabino, ni devis eksidi ĉirkaŭe sur la bareloj kaj pakaĵoj.

La eklezia sinjoro elpakis nun grandan rostaĵon kaj buterpanpecojn, envolvitajn en paperon; li ankaŭ eltiris el ujo kelkajn vinbotelojn kaj arĝentan, interne orumitan pokalon, enverŝis, gustumis, flaris kaj ree ekzamenis kaj prezentis poste al ĉiu el ni. La studentoj sidis tute vertikale kiel kandeloj sur siaj bareloj kaj manĝis kaj trinkis nur tre malmulton pro granda respekto. Ankaŭ la knabino nur trempis la beketon en la pokalon kaj ĉi-kune rigardis honteme nun al mi, nun al la studentoj; sed **ju pli** ofte ŝi rigardis nin, des pli ŝi fariĝis kuraĝa iom post iom.

Fine ŝi rakontis al la eklezia sinjoro, ke ŝi nun la unuan fojon eliris elhejme al servado kaj ĝuste estis vojaĝanta al la kastelo de siaj novaj gesinjoroj.

Mi ruĝiĝis tutvizaĝe: ĉar ŝi nomis la kastelon de la bela sinjorina moŝto. — Tiu do estas mia estonta ĉambristino! mi pensis kaj rigardis ŝin grandokule, kaj preskaŭ mi svenis. —

„En la kastelo baldaŭ granda geedziĝo okazos", poste diris la eklezia sinjoro.

„Jes", respondis la knabino, kiu volonte estus sciinta pliaĵon pri la afero; „oni diras, ke estas jam malnova, kaŝita interamo, sed ke la grafino neniam volis konsenti."

La ekleziulo respondis nur per „hm, hm", dum ke li plenverŝis sian ĉaspokalon kaj kun meditemaj mienoj trinketis el ĝi. Sed mi per ambaŭ brakoj estis apoginta min tute antaŭen sur la tablon, por kiel eble plej precize aŭskulti la interparolojn.

La eklezia sinjoro rimarkis tion. „Mi ja povas malkaŝi al vi", li reekparolis, „ke ambaŭ grafinoj sendis min, por esplori, ĉu eble la fianĉo jam estas en la ĉi-tiea regiono. Sinjorino el Roma skribis, ke jam delonge li estas for de tie."

Kiam li ekdiris pri la sinjorino en Roma, mi ree ruĝiĝis.

„Ĉu do via pastra moŝto konas la fianĉon?" mi demandis tute konfuzite.

„Ne", respondis la maljuna sinjoro, „sed laŭdire li estas vagema birdo."

„Ho jes", mi diris rapide, „birdo, kiu elfugas el ĉiu kaĝo, kiam ajn ĝi povas, kaj kiu gaje kantas, estante ree libera."

„Kaj kiu vagadas en fremdlando", la sinjoro daŭrigis trankvile, „kiu nokte iras por promenadi kaj dumtage dormas antaŭ la dompordoj."

Tio min multe ĉagrenis. „Pastra moŝto", mi kriis tute ardanta, „pri tio oni informis vin malĝuste. La fianĉo estas moralplena, gracia, esperiga junulo, kiu en Italujo pompe vivis en malnova kastelo; kiu estis kunulo nur de grafinoj, famaj pentristoj kaj ĉambristinoj; kiu tre bone scias ŝpareme konservi sian monon, se li havus iom da ĝi; kiu —."

„Nu, nu, mi ja ne sciis, ke vi konas lin tiel detale", ĉi tie la ekleziulo interrompis min kaj ĉi-kune ridis tiel kore, ke li fariĝis tute blua en la vizaĝo kaj la larmoj venis el liaj okuloj.

„Sed mi ja aŭdis", nun ree aŭdiĝis la knabino, „ke la fianĉo estas altranga, treege riĉa sinjoro."

„Ho, Dio, jes, certe jes! Konfuziĝo, ĉio nura konfuziĝo!" kriis la ekleziulo kaj pro ridado ĉiam ankoraŭ ne povis trankviliĝi, ĝis kiam fine li falis en senĉesan tusadon. Kiam li estis iomete retrankviliĝinta, li alten levis la pokalon kaj kriis: „Vivu la gefianĉoj!"

Mi tute ne sciis, kion pensi pri la ekleziulo kaj liaj paroloj; sed pro la Romaj aferoj mi hontis, ĉi tie diri al li publike, ke mi mem estas la perdita, feliĉega fianĉo.

La pokalo ree rondiris vigle; dume la eklezia sinjoro afable parolis al ĉiuj, tiel ke baldaŭ ĉiu amikiĝis al li kaj fine ĉiuj gaje babiladis samtempe. Ankaŭ la studentoj fariĝis pli kaj pli parolemaj kaj rakontis pri siaj vagadoj en la montaro, ĝis kiam fine ili eĉ alportis siajn instrumentojn kaj komencis gaje blovi. La malvarmeta superakva aero dume fluis tra la branĉoj de la laŭbo, la vespera suno jam orumis la arbarojn kaj valojn, kiuj rapide flugis preter ni, dum ke la bordoj reĵetis la kornosonojn.

Kaj kiam poste la ekleziulo fariĝis pli kaj pli gaja per la muziko kaj rakontis bonhumorajn aferojn el sia junaĝo: kiel ankaŭ li dum la libertempo vagis trans montojn kaj valojn kaj ofte estis malsata kaj soifa, sed ĉiam gaja, kaj ke versence la tuta studenta vivo estas granda libertempo inter la malvasta, malhela lernejo kaj la serioza ofica laboro — tiam la studentoj ankoraŭ unufoje trinkis rondvice kaj poste freŝvoĉe ekkantis, ke sonis malproksimen inter la montojn:

Al sudaj landoj flugas
la birdoj are nun,
kaj la ĉapelojn svingas
migrantoj tra l' aŭtun'.
Kun siaj muzikiloj
studentoj vagas for
kaj migrokanton blovas
en adiaŭa hor':
Ho Praha, ni foriras,
al malproksim' sopiras:
Et habeat bonam pacem,
qui sedet post fornacem!

Geviroj belvestitaj
dancfestas en salon';
ni staras ĉe la pordo
kaj blovas laŭ bezon'.
Sed tio soifigas,
kaj tial nia kri':
He, mastro gastigisto,
trinkaĵon tuj por ni!
Kaj vidu, sen obstino
kun kruĉo jam da vino
venit ex sua domo
beatus ille homo!

Malvarme tra l' arbaroj
jam blovas Boreas';
de pluv' ni malsekiĝas
kiel sovaĝanas'.
Siriĝis niaj ŝuoj,
pan' mankas kaj viand' —
kaj tamen ni persistas
ĉe la muzik' kaj kant':
Beatus ille homo,
qui sedet in sua domo
et sedet post fornacem
et habet bonam pacem!

Mi, la ŝipistoj kaj la knabino, kvankam ĉiuj nesciantaj la latinan lingvon, ĉiufoje kunkantis ĝojkriante la lastajn versojn. Sed mi kriis plej ĝojege; ĉar mi ĝuste vidis en la malproksimo mian impostdometon kaj baldaŭ poste ankaŭ la kastelon en la vespera suno elvenantaj super la arboj.

Deka ĉapitro

La ŝipo albordiĝis; ni saltis rapide sur la teron kaj disiris ĉiuflanken inter la verdaĵo kiel birdoj, kiam subite la kaĝo estas malfermata. La eklezia sinjoro rapide adiaŭis kaj grandpaŝe iris al la kastelo. Kontraŭe la studentoj fervore rapidis al kaŝita arbetaĵo, kie ili frapis la polvon el siaj manteloj, volis lavi sin en preterfluanta rivereto kaj razi unu la alian. La nova ĉambristino kun sia kanario kaj kun la pakaĵo sub la brako iris al la restoracio ĉe la kastelmonto, por tie ĉe la estrino, kiun mi estis rekomendinta al ŝi kiel bonan personon, surmeti pli bonan veston, antaŭ ol ŝi prezentu sin supre en la kastelo. Sed al mi la bela vespero lumis tra la koro; kaj kiam nun ĉiuj estis foririntaj, mi ne longe hezitis kaj kuregis tuj al la sinjora ĝardeno.

(Daŭrigota)

Aŭtunaj poemoj

Herbsttag

Dies ist ein Herbsttag, wie ich keinen sah!
Die Luft ist still, als atmete man kaum,
und dennoch fallen raschelnd fern und nah
die schönsten Früchte ab von jedem Baum.

O stört sie nicht, die Feier der Natur!
Dies ist die Lese, die sie selber hält;
denn heute löst sich von den Zweigen nur,
was vor dem milden Strahl der Sonne fällt.

Friedrich Hebbel.

Aŭtuna tago

Aŭtunan tagon tian vidis mi
neniam. Ne spirblovo en l' aer'
kaj tamen, kvazaŭ gaja en ebri'
plej belaj fruktoj falas al la ter'.

Ne ĝenu ĝin, la feston de l' Natur'!
Jen la rikolto kiun faras ĝi.
Hodiaŭ falas de la branĉoj nur
la fruktoj de l' somera sunradi'.

Tradukis Jofebo.

Aŭtuno

La lasta fagfolio
nun falis sen kompat';
finita estas ĉio,
la ĝojo, la amad'.

Je l' rozarbeto restis
ne bela florpurpur';
kaj via ĵuro estis
malplenaj vortoj nur!

En miaj revoj vidas
la rozojn mi en flor';
sed kiam mi vekiĝas,
mi frostas ĝis la kor'.

Originale de W. Latsch

Aarhus - Bad Harzburg

per Esperanto

Tiuj vortoj staris sur afiŝoj kiuj pendis en du aŭtobusoj, ĉirkaŭ kiuj grupo da Esperantistoj danaj en la frua mateno kolektiĝis kune kun la gvidantoj, s-ro L. Friis kaj lia edzino, por komenci 6-tagan vojaĝon al la belega Harzmontaro. En Horsens, Vejle kaj Fredericia aliĝis aliaj Esperantaj grupoj, kaj kiam ni forlasis Danujon ni estis 36 ĝojaj kaj bonhumoraj partoprenantoj.

En Rendsborg du samideaninoj per belega Esperanto rakontis pri la Kieler Kanal kaj la grandega fervoj-ponto. Sed nia vojo estis longa, kaj ni ne havis tempon resti pli ol kelkajn minutojn tie. Suden tra Neumünster, Hamburg, tra la vasta Lüneburger Heide al Lehrte, kie s-ro Heinrich Müller kaj lia amiko atendis por esti niaj lokaj gvidantoj en la Harz. Estis tre malfrue, kiam ni atingis nian loĝejon en la junulmigrulejo de la natur-amikoj en Bündheim.

Post mallonga dormo ni vekiĝis en belega regiono. La migrulejo situas sur deklivo kun ĉarmega panoramo trans la valo de Oker.

Estis dimanĉo, kaj gesamideanoj el Hannover kaptis la okazon esti kune kun ni dum la posttagmezo por diskuti kaj ĝui la belan naturon. Vivu Esperanto, kiu donas al ni la eblecon esti kune kun samideanoj el diversaj landoj kaj interparoli kun ili.

Lundon ni vizitis Bad Harzburg kaj per la ŝnur-fervojo ni atingis la interesan kaj belegan Burgberg, kie ni ĝuis la ĉarmegan vidaĵon trans la valon de Oker. Post bela sed laciga piediro malsupren laŭ la monto tra belaj valoj kaj arbaroj kun ridetantaj riveretoj ni atingis nian loĝejon, plenaj de impresoj belegaj de tiu grandioza regiono.

Posttagmeze ni vizitis la mezepokan urbon Goslar kun la karakterizaj ardez-tegmentaj domoj.

Mardon okazis tuttaga veturo tra la Harzmontaro, preter la akvofalo de Radaŭ, al la monto Achtermannshöhe, sur kiu ni grimpis en arda suno. Sed kiu panoramo! Arbaroj, lagoj, montpintoj antaŭ niaj okuloj ĝis la horizonto. Tra la „fera kurteno" ni vidis la monton Brocken. En Clausthal-Zellerfeld ni vizitis minejon, tre interesan iradon tra la minfosaĵo ni faris, kaj poste, en Bad Grund, la kulmina punkto de la tago, la vizito en la stalaktit-kaverno de Iberg. La stalaktito formas multajn fantaziajn figurojn, jen estas elefanto, jen serpento, jen Evo kaj Adamo, jen belega akvofalo, kaj sur la planko la stalagmito formas ekz. testudon.

Merkredon ni traveturis la belegan Oker-valon, haltis ĉe la akvofalo Romkerhalle, kaj eĉ unufoje ni grimpis sur monton Kästeklippe, ĝis ni staris sur la pinto, kiu nur konsistas el grandegaj ŝtonoj; eble iam en la estunteco iu giganto ĵetis ilin tien.

La lasta nokto en la Harzmontaro donis al ni alian travivaĵon, fulmotondron, kiel ni nur en la montaro povas vidi ĝin. Efekta fino de belega restado en ĉarmega regiono.

Reveninte al Danujo ni ĉiam denove travivas la interesajn tagojn kun niaj germanaj samideanoj, kiuj faris ĉion por ke ni povu havi tiel agrablan ferion.

L. Sogård, Skive, Danujo.

Libreto el Japanujo

Antaŭ nelonge mit ricevis libreton el Japanujo, kaj mi supozas, ke apenaŭ iu el la germana Esperantistaro konas ĝin. Gia nomo estas **„Historio de Yukawa-Teorio"**. Mi ne intencas recenzi ĝin laŭ la kutimo, ĉar ĝi postulas de la leganto kelkan scion de la moderna fiziko. Tamen ĝi meritas, ke mi maldetale raportas pri ĝi ankaŭ al nefaka legantaro.

La libreto estas publikigita de „Esperanto-Rondo en Naturscienca Fakultato de Osaka Universitato". Ĉu ne estas mirige, ke inter la studentoj de nur unu fakultato estas sufiĉe da Esperantistoj por estigi vivipovan kaj produktivan grupon? Ni memoru, ke en Germanujo universitata Esperanto-grupo ankoraŭ estas maloftaĵo. Generale en Japanujo Esperanto estas pli multe afero de studentoj kaj sciencistoj ol en aliaj landoj, kaj tial sciencaj verkoj havas preferon. Laŭ la antaŭparolo la libreto propagandu Esperanton en la scienca mondo, speciale inter la tutmonda studentaro. Ne surprizas, ke oni elektis Prof-on Yukawa kaj lian verkon kiel temon, ĉar li estas la idolo de la junaj natursciencistoj japanaj, kaj lia populareco estas komparebla kun tiu de Prof-oj Einstein kaj Heisenberg en nia lando.

Kion faris Prof. Yukawa? Li faris teorion por klarigi la esencon de la fortoj efikantaj en atomkerno. Oni estis eltrovinta, ke atomkernoj konsistas el du specoj de elementaj korpuskloj: protonoj kaj neŭtronoj. Sed kia forto interligas iliin kaj igas ilin formi firman atomkernon? Ĉiuj fortoj tiam konataj de la fizikistoj ne estis taŭgaj por kompreniĝi ĉi tiun fakton. Do plia forto devas ekzisti, la t. n. kernforto. Prof. Yukawa sukcesis interpreti ĝin. Li antaŭdiris la ekziston de nova korpusklo, nomata mezono, kiu respondas al la kernforto laŭ certa maniero. Estis granda triumfo por la tuta teoria fiziko, kiam ĉirkaŭe du jarojn post la publikigo de la Yukawa-teorio tiaj korpuskloj estis trovataj eksperimente. En la jaro 1949 Prof. Yukawa ricevis la Nobelpremion.

La libreto detale montras la disvolviĝon de ĉi tiu teorio, sed ĝi ankaŭ konvinke montras la internaciecon de la scienco, la kunlaboron de diverslandaj sciencistoj pri la sama problemo. Ĉu ne estas simpla konsekvenco, ke la sciencistoj ankaŭ uzu saman internacian lingvon? Tion Prof. Egami, delegito de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista), komentas en la ĉapitro „Scienco kaj Esperanto", aldonita al la scienca parto de la libreto. Li ankaŭ raportas pri sciencaj traktaĵoj aperintaj en Esperanto.

Sed kiu havas okazon foliumi en fakrevuoj venantaj el diversaj landoj, tiu devas serĉi longe, antaŭ ol trovi Esperanton kiel komunikilon. Nu, „Scienca Revuo" aperas en Esperanto, sed tio ne sufiĉas, ĉar la multnombraj fakrevuoj, disvastigitaj en tutmondo, estas la ĉefaj interligiloj de la sciencistaro. En ilin Esperanto devas esti enkondukata, por ke ĝi fariĝu la lingvo de sciencujo. Ĉi tiu vojo estas irebla. Tion ekz. la usona fizikisto D-ro Belinfante pruvas per siaj artikoloj en la revuo „Progress of Theoretical Physics" (Progreso de Teoria Fiziko), pritraktantaj tre malsimplajn problemojn de la moderna teoria fiziko. Sed ankorau li apartenas al la esceptoj. Tial mi deziras multe da sukceco al la japana libreto. Ĝi helpu konvinki la sciencistojn pri la utileco kaj la avantaĝo de Esperanto por la scienca laboro internacia.

Manfred Siebert

La motoro strikas iomete inter Bad Grund kaj Clausthal Zellerfeld

Ni grimpas kaj ripozas sur Käste-rokoj

Foto: Müller, Lehrte

EŬROPO VOKAS

ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO-MOVADO ESPERANTISTA

Ni havas la medicinon por nia malsana kontinento

Hodiaŭ ni ne bezonas multajn vortojn por pruvi, ke la unuiĝo de Eŭropo estas necesa. El du militoj ni spertis, ke la malpaco en Eŭropo alportis nenion bonan. Venkintoj kaj venkitoj konstatis, ke ili estas hodiaŭ multe pli malriĉaj ol antaŭe. Kion ni donus, se ni povus estingi la jarojn de la du lastaj militoj!

Ĉiutage ni vidas la ruinaĵojn de niaj urboj kaj vilaĝoj, ĉiutage ni renkontas multajn homojn, kiuj suferadas grandajn korpajn domaĝojn. Patrinoj, vidvinoj kaj orfoj funebras pro siaj parencoj, kiuj estas mortigitaj en kruelaj bataloj aŭ entombigitaj sub iliaj detruitaj domoj. Ankaŭ niaj ekonomiaj rilatoj estas senordaj. Grandega impostaro premas nin ĉiujn.

Eŭropo kiel kontinento malfortiĝis. Fortiĝis aliaj kontinentoj kaj iĝis la gajnintoj de la militoj. La popoloj de Eŭropo nun estas komprenintaj, ke ili faris grandan malsaĝaĵon, kontraŭbatalante unu la alian. Tial post la dua mondmilito en la diversaj landoj de Eŭropo kreskis multaj organizoj por unuigi nian kontinenton. Ĉiuj volas, ke Eŭropo iĝu vivanta organismo, ke ĝi kresku kaj gajnu denovan influon en la mondo. En Strasburgo formiĝis la Eŭropa Konsilantaro. Kvankam ĝi ne havas multajn rajtojn, oni povas laŭ granda optimismo nomi ĝin la koro de la nova Eŭropo. Sed ho ve! Ne povas cirkuli la sango tra la vejnoj. Naŭdekkvin procentoj de la Eŭropa korpo ne povas esti trafluataj de sango, ĉar ili ne komprenas unu la alian. La nova Eŭropo suferas je necirkulado de sango. Tiu ĉi malsano ja estas moderna, sed samtempe tre danĝera. Ni ĉiuj scias, ke ĉiu korpo devas morti, en kiu neniam cirkulas la sango.

Ni esperantistoj, ni havas en nia lingvo la ilon, por forigi la barojn en la vejnoj de Eŭropo. Nia lingvo estas tiel facile lernebla, ke ĉiu normala europano povas lerni ĝin. **La ĝisnunaj organizoj paneŭropanaj** bedaŭrinde malŝatis Esperanton. Ili organizas kunvenojn, sed la kunvenintoj ne komprenas unu la alian. Ili havas gazetojn, sed la eksterlandaj eŭropanoj ne povas legi ilin. Ili volas kanti komune, sed ili ne havas tekston komunan. Kiam je Kristnasko 1949 infanoj el ĉiuj eŭropaj landoj estis kantintaj siajn belajn kantojn naciajn, ili volis kanti ankaŭ komune, sed ili ne povis. Por tio ili murmuris, zumis senvorte, neparole kiel infanetoj.

Esperanto — lingvo de Eŭropo

Oni kutimas diri, ke Esperanto estas Lingvo Universala. Tia ĝi estas efektive, ĉar ĝi servas jam nun al interkompreno de ĉiuj pololoj de la terglobo. Sed en la nuna fazo de la historia evoluo, nia Zamenhofa lingvo estas antaŭ ĉio lingvo de la Eŭropanoj, lingvo por la Eŭropanoj.

Fakte oni povas distingi en la nuna mondo tri grandajn regionojn: 1. la anglan lingvoteritorion, kie lingvo internacia ne estas necesa kiel interkomunikilo; 2. la orientan, esence azian regionon, kie popoloj ĉefe agrikulturaj kaj analfabetaj nur tre malmulte interkontaktas kaj, sekve, ankoraŭ ne bezonas komunan lingvan kontaktilon; 3.) Eŭropon, kie multe da movemaj, altcivilizaj, diverslingvaj popoloj loĝas sur malvasta spaco, ĉiutage amase renkontiĝas, sin senĉese vizitadas kaj sentas kreskantan, nepran, urĝan bezonon je komuna lingvo. Pro la egalvaloro de la diversaj eŭropaj nacioj, neniu el ili povos trudi al la aliaj sian lingvon kiel komunan lingvon.

El la ĵus menciitaj faktoj sekvas, ne nur ke la bezono je lingvo internacia estas multe pli akra en Eŭropo ol en iu ajn alia mondoparto, sed ankaŭ ke la ĉeftereno de la Esperanto-propagando devas esti Eŭropo. Eŭropo bezonas Esperanton, kaj Esperanto bezonas Eŭropon.

Esperanto fariĝos lingvo tutmonda nur tiam, kiam ĉiuj partoj de nia tero havos unuj kun la aliaj plej streĉajn rilatojn ĉiuspecajn: komercajn, ekonomiajn, kulturajn, amas-personajn. Sed jam nun ĝi povas esti amplekse uzata interligilo tie, kie tiaj rilatoj estas kvazaŭ sennombraj, t. e. en Eŭropo. Kiel lingvo tutmonda Esperanto estas nuntempe nura promeso aŭ perspektivo por la estonteco. Kiel lingvo de Eŭropo Esperanto povas — kaj eĉ devos — esti morgaŭa realo.

Prof. Lucien Laurat
Prof. ĉe la Europa akademio en Bruĝo.

Nia simbolo

Ofte oni diras, ke ni volas forigi ne nur la naciismon, sed ankaŭ la bonajn naciajn ecojn. Tio ne estas vera. Por esprimi tion, nia surskribo enhavas la ĉielarkon.

La ĉielarko montras, ke absolute estas eble unuigi diversajn kolorojn en bela harmonio.

La ĉielarko estas la granda ponto de dekstro al maldekstro, de okcidento al oriento.

La ĉielarko estas la ponto de tero al ĉielo, de homoj al Dio.

La ĉielarko estas jam en la Malnova Testamento la signo de paco inter Dio kaj homoj.

La ĉielarko estas la natura simbolo, ke fulmotontrado estas finita.

Por ke la fulmotondroj eŭropaj finfine estu finitaj, ni unuigu niajn korojn kaj niajn fortojn.

Dr. Jos. Holtmann, Beckum (Westf.)
Prezidanto de la Eŭropa Sekcio de GEA.

Alvoko

Kreskadas senĉese la nombro de tiuj, kiuj komprenas, ke la unuiĝo de Eŭropo estas nepra kaj sola protektilo kontraŭ la danĝeroj, kiuj minacas la naciojn de nia kontinento. Sed efektiva unuiĝo estos ebla nur, se ĉiuj Eŭropanoj havas komunan lingvon, kaj se tiu komuna lingvo estas neŭtrala. Ĉiuj historiaj spertoj ĝis nun faritaj pruvas ke klopodoj, trudi iun nacian lingvon al supernacia komunumo, fiaskis kaj eĉ kondukis al la pereo de tiuj komunumoj. La lasta ekzemplo, el kies detruigaj konsekvencoj la tuta Eŭropo ankoraŭ hodiaŭ suferas, estas la disfalo de Aŭstrio-Hungario.

Ni meditu pri la lecionoj de la historio, ni evitu la iam faritajn erarojn kaj ni elektu por Eŭropo lingvon neŭtralan: Esperanton!

Prof. Lucien Laurat

En Hispanio

(Fino) **Raporto verkita speciale por EP de E. E. Yelland**

Ĉiunoktomeze dum unu semajno artfajraĵoj iluminis la nigran ĉielon, kaj iuj dancadis ĝis la dua kaj tria horo en la mateno.

Sur la sama longa promenejo okazis „Batalo per flloroj". Sur pli ol cent diversformaj veturiloj, ornamitaj per diversspecaj kaj varikoloraj floroj, sidis belaj fraŭlinoj en blankaj roboj. Miloj kaj miloj da rigardantoj sidis sur rezervitaj seĝoj ambaŭflanke de la aleo. La junulinoj en la veturiloj ĵetadis florojn sur la publikon, kiu reciproke ĵetis florojn al la fraŭlinoj sur la veturiloj. Post nelonga tempo la promenejo aspektis kiel tapiŝo el floroj. Tie kaj tie ĉi sandviĉis la longan procesion muzikistaroj kaj kavalkadoj, kies kavaliroj, vestitaj en regionaj kostumoj, rajdis sur ĉevaloj kun broditaj dorskovriloj. Tiu spektaklo estis treege plaĉa al la okuloj.

Mi ne forgesu la bankedon ĉe la marbordo. Gajaj kaj feliĉaj gesamideanoj, proksimume 250, sidis ĉe bone garnitaj tabloj kaj bone manĝis kaj trinkis. Sur la tabloj staris boteloj da ĉampano. Sur bendo ĉe la kolo de la boteloj estis presita „Bongusta (Verda Stelo) Dolĉa". La etikedo kun verda stelo kaj terglobo portas la vortojn „Saŭmanta Vino" kaj Verdan Stelon. Post la manĝo la rezulto de la literaturaj konkursoj estis deklarita. Estis pli ol 70 partoprenantoj, kaj estis tre malfacile al la juĝantoj decidi pri la meritoj de la literaturaĵoj, ĉar preskaŭ ĉiu estis de alta kvalito. La unua premio por poezio estis aljuĝata al s-ro Luigi Minnaja, Romo. Kelkaj premiitoj deklamis siajn verkojn, kaj estis laŭte aplaŭdataj.

En kvar aŭtobusoj gegajuloj faris ekskurson al la strando de Saler. Tie, proksime al la sabla marbordo, staras multjaraj pinioj, sub kiuj aliaj ekskursantoj manĝis kaj ripozis. Mi iris inter unu aro kaj vidis aŭtobuson el Francio kaj mi komencis propagandi Esperanton. Baldaŭ mi trovis malnovan Esperantiston, kiu flue parolis en Esperanto. De multaj jaroj li, pro diversaj cirkonstancoj, ne estas membro de iu ajn organizaĵo de nia movado kaj li tute ne scias, kio okazas en niaj rondoj. Eble, mi ree ekbruligis la flamon ĉe li. Antaŭ ol tagmanĝi iuj ekskursantoj trempis sin en la maro. Inter ili estis mi, viro kun griza barbo. Parolante pri barbo: Multaj infanoj, kaj ofte personoj, haltis por klare vidi mian barbon, ĉar multaj infanoj neniam antaŭe vidis viron kun barbo, speciale blanka. La ondoj ĉe la marbordo balais ĉion antaŭ si, kaj oni ne povis trankvile stari en la akvo. Naĝi sur tiaj ondoj estis tre malfacile kaj tre penige. Sur la strando deĵoris viro en uniformo por malpermesi, ke virinoj, belformkorpaj junulinoj, aŭ junuloj estu sur la sablo en kostumo, kiu ne kovras la tutan korpon. Neniu estis permesata eĉ kuŝiĝi sur la sablo. Rezulto: la sabla marbordo restadas en sia natura nudeco.

En Valencio la glaciaĵoj estas tre bongustaj kaj nemultekostaj. Ĉiutage oni suĉas du aŭ tri glaciaĵojn.

Somere, la ĉefa trinkaĵo en tiu urbo estas nomata „Horchata chufa". Ĝi estas dube blanka, iom simila al lakto, dolĉeta. El kio estas farata tiu trinkaĵo? Kia devas esti la nomo en Esperanto? Mi serĉis la signifon de la vorto „Horchata" kaj trovas, ke en Esperanto ĝi estas: Hordeo, A. Barley, F. Orge kaj orgeat (suko farata el hordeo; nuntempe suko el migdalo, aŭ suko el aliaj semoj). Chufa = A. Tiger-nut, F. Souchet, L. Cyperis (Do, blanka trinkaĵo farata el la dolĉeta suko de la rizomo de Cipero).

Dum la varma sezono ĉiu trinkas cipersukon.

Fine venis la ferma kunsido, en kiu oni multe diskutis pri la presigo de plena vortaro hispana-esperanta. Tiu vortaro baldaŭ aperos. Post longa diskuto estis akceptata la invito okazigi la XIVan kongreson en Bilbao en la jaro 1953. S-ro Luis Hernández longe parolis pri la eldonado de la „Boletín" de la Hispana Esperantista federacio, kiun li redaktas dum multe da jaroj. Oni atente aŭskultis al liaj diroj, dankegis lin pro lia multjara kaj bonega laboro, kaj faris al li longan ovacion.

La kongreso estis modele aranĝita kaj mi gratulas ĉiun, kiu laboris por fari la kongreson tiel sukcesa.

Grade la kongresanoj el malproksimaj urboj forlasis Valencion, laŭte kriante „Ĝis la revido en Bilbao".

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

abfertigen (Leute) servi
Absolvent plenuminto (de ekzameno)
Brieftelegramm letertelegramo
Eilbrief ekspresa letero
einbehalten (z. B. behördlich) retenu
Erfassungsstelle registrejo, manchmal auch: centro
Familienstand edziĝostato
Farbband farbo/bendo, koloril-, ~zonenschaltung farbobenda zonŝanĝilo
„fliegende Untertasse" fluganta disko
gebührenpflichtige Dienstsache oficiala poŝtaĵo afrankenda
Heft/klammer 1. Büroklammer: slipkrampo; 2. zum ~en: broŝurkrampo, ~maschine krampobroŝurilo
Kenn/karte legitimilo **~nummer** identiga, individua numero
Kohlepapier karbopapero (Enc. Vort.)
für kraftlos erklären deklari malvalid/a- igi
Kriegsschädenamt oficejo pri militdifektoj
Leertaste (Schreibmaschine) interspac-klavo
Montanunion minafera unio, karbo- kaj ŝtalunio
Ordner (Akten~) akt/ord/igilo, -registr-
porto/pflichtig afrankenda, **~frei** neafrankenda, afranki(n)te
Postschließfach poŝtfako
Randsteller (Schreibmaschine) marĝenfiksilo
Reiter (auf Karteikarten) indikilo, markilo
Rücktaste remova klavo
Rund/lauf cirkulaĵo (~schreiben = cirkulero)
schwarzes Brett inform/tabulo, afiŝ- (denn nigra tabulo meist = Tafel)
Schweigelager kaptitejo senkoresponda
(Schnell)hefter akt/bindilo, leter-, **einheften, ab-** (for)meti en aktbindilon
steuer/begünstigt favorimposta, **~frei** neimpostata, senimposta
Unbedenklichkeitsbescheinigung atesto de permesebleco
in Verfolg en la sekvado de...: pro...
Zahlkarte (poŝta) pagokarto
der Zug der Zeit tendenco de l' epoko
im Zug der Grundstückszusammenlegung plenumante la kunigon de terenoj (efektivigante..., oder einfach dum...)
Zustellgebühr alportkosto

Hans Wingen

Iom pri atomfiziko

Ekzistas multaj esprimoj kunmetitaj kun la vorto atomo, ekz. atomenergio, -modelo, -radio, -pezo ktp. Ili estas tre simplaj, same kiel multaj terminoj, egalaj en Esperanto kaj en germana lingvo, escepte de la finaĵoj, ekz. protono, neŭtrono, elektrono ktp. Do mia ĉi-sekva kolekto da fakesprimoj, por resti populara, fariĝis tre malampleksa.

Terminareto de atomfiziko

Atombau atomstrukturo
Elementarteilchen elementa korpusklo
Kernspaltung disfaligo de atomkerno
Kernladung (elektrisch) kernŝargo
Kernteilchen nukleono
Lichtquant fotono
Meson mezono
Quantentheorie kvantuma teorio
künstliche Radioaktivität artefarita radioaktiveco
radioaktiver Zerfall radioaktiva disfalado
Wellenmechanik ondmekaniko
Zyklotron (Beschleunigungsapparatur) ciklotrono

M. Siebert

Solvo de la traduktasko n-ro 23

Estis antaŭvideble, ke ĉi tiu tasko ne trovos tre grandan nombron da partoprenantoj. Nur malmulte pli ol duona dekkuo havis la kuraĝon „ataki" la paradoksojn, kaj ne ĉiuj el ili, bedaŭrinde, komprenis la ĝustan sencon de la tasko. Ne estis ĝia celo havigi laŭvortan tradukon de la 14 frazoj. Tute evidente ĉe multaj el ili la paradokseco, konsistanta tre ofte nur el germanlingva vortludo aŭ parolturno, tute malaperis ĉe la traduko Esperanten. Ekz. kiam iu tradukis la frazon „...wenn ein Wirtschaftsminister nie in eine Wirtschaft geht" per „...kiam (aŭ: se) ekonomiministro neniam iras en gastejon", tiam en ĉi tiu frazo enestas nenia paradokso, ĉar Wirtschaft (ekonomio **kaj** gastejo) havas **nur** en germana lingvo tiujn du signifojn (kaj eĉ kromajn), ne en Esperanto. Do ankaŭ la ĝuste tradukitaj frazoj, sed en kiuj perdiĝis la paradokseco, ne povis gajni poentojn.

Kelkaj aliaj solvintoj, kontraŭe, tre bone komprenis la aferon kaj aldonis ankoraŭ aliajn paradoksaĵojn, ekz.:

...kiam (se) multkolora pentraĵo estas griza,
...kiam (se) iu serĉas vane mitulojn en la mitoj,
...kiam (se) esperantisto malesperas,
...kiam (se) tenoristo havas bas-tonon,
...kiam (se) hor-loĝisto loĝas tutan jaron en la sama domo,
...kiam ora kolĉeno ne estas kol-ora,
...kiam (se) hirundo kovas super alk- ovo,
...kiam (se) alkovo ne estas destinita al kovo,
...kiam (se) oni glaciaĵon varme rekomendas,
...kiam (se) librotenisto lasas fali libron,
...kiam (se) librotenisto tenas kajeron,
...kiam (se) iu havas maldikan dikfingron,
...kiam (se) okcidentalisto loĝas en oriento,
...kiam (se) malariulo kantas arion,
...kiam (se) barbaro ne portas barbon,
...kiam (se) oni ridas larmojn,
...kiam (se) persekutante muson trovas muskaton,
...ke pensiono enspezigas pli multe da mono ol pensio,
...ke Sardinio ne estas la lando de la sardinoj,
...ke oni nomas ĉiuvoĉan aprobon unuvoĉa,
...ke en Esperanto ne ekzistas leoj, kvankam ekzistas leonoj kaj leopartoj (ho ve! la red.),
...ke muso havas nur unu kolon kaj tamen multajn mus/kolojn
...ke la Oktobran Feston en Munkeno oni festas dum septembro,
...ke amaranto ne estas amara kaj lekanto ne lekas,
...ke tripiedo ne povas marŝi, tridento ne mordi,
...ke ofte ankaŭ katolikoj estas protestantoj,
...ke ario pri rozoj tamen ne estas rozario,
...ke kolo neniam atingas la longon de kolono,
...ke kata-strofo tiel ekscitas la homojn,
...ke rabato ne estas rabata, sed libervole donata,
...ke kulero estas multe pli peza ol kulo,
...ke gazeto ne konsistas el gazo.

Ne estas paradokse, ke fago kaj piro ne estas fagopiro

...ke multaj komisionoj ne kapablas plenumi eĉ unu komision,
...ke el multaj milonoj fariĝas milionoj,
...ke kaloj ne sonas, ĉar alie estiĝus ja kalsonoj (!!),
...ke uniformo unuformigas la homojn,
...kiam (se) mi daŭrigus tiun liston ĝis la tago de S-ta Neniamo — kiel skribis iu solvinto.

Nun ni publikigas Esperantan liston de la frazoj el n-ro 8, kiuj estas pli-malpli facile tradukeblaj:

Estas paradokse

1. ...kiam stara horloĝo moviĝas,
2. ...kiam oni estas en la kvina etaĝo kantante: En kel' profunda sidas mi,
3. ...kiam birdkaptisto ekkaptas kataron,
4. ...kiam ĉasisto ĉasas ŝtelĉasiston,
5. ...kiam dueto sonas monotone,
7. ...kiam fabrikanto de pesiloj perdas la animan ekvilibron,
8. ...kiam iu estas ĝisosta (enkarniĝinta) vegetarano,
9. ...kiam pianagordisto ne povas agordigi en- kaj elspezojn,
10. ...kiam ĉenfumanto poredas eĉ ne unu ĉenon hejme,
11. ...kiam klarvidisto vidas nebule,
12. ...kiam ekonomiministro elspezas sian mono malekonomie,
13. ...kiam orkestresto havas malharmonian karakteron,
14. ...kiam ĉenhundon oni tenas per ŝnuro.

La eldonejo fiksis kromajn unuan kaj duan premiojn. La gajnintoj estas:

1. S-ro Heinrich Fries, Bensheim,
1a. Ĥŭan kaj Hotero,
2. S-ino Gudula Thenée, Bonn,
2a. S-ro Johann Klerks, Bottrop,
3. S-ro Günter Wilsdorf, Berlin
(kiu meritas duan premion, sed propravole deziras la trian).

AUF DEM Büchertisch

F. Omelka, **La Alaska stafeto** kaj **Kaptitoj de la glacirokoj.** Bindita, 14×22 cm, 96 paĝoj. The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. Prezo 6 ŝilingoj afranko 4 p. Aĉetebla ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe UEA.

Zwei äußerst spannende Erzählungen, die zunächst in „Esperanto", der UEA-Zeitschrift abgedruckt waren. Ihr Verfasser, ein tschechischer Esperantist, beweist mit ihnen, daß er packend zu erzählen versteht und den Leser nicht mehr aus seinem Bann läßt.

Die erste Erzählung führt uns in den höchsten Norden Alaskas, eines Landes, von dem der Durchschnittseuropäer nicht allzu viel weiß, vielleicht mit Ausnahme des Umstandes, daß es einmal das Ziel von gewaltigen Scharen goldberauschter Männer war, die dort meistens abenteuerlich umkamen. Das Alaska dieses Tatsachenberichtes, denn ein solcher ist es viel eher, ist friedlich, die Menschen sind wie wir, vielleicht etwas besser, und die unblutigen Heldentaten, die von einigen kühnen Männern begangen werden, um das Heilserum zur Niederschlagung einer Epidemie im schrecklichsten Polarwinter herbeizuschaffen, sind es wohl wert, besungen zu werden.

Die zweite Erzählung berichtet uns vom Schicksal eines Verkehrsflugzeuges, das in den Alpen „strandete". Auch hier ist der Leser derart gefesselt, daß er das Bändchen wohl nicht eher aus der Hand legt, bevor er nicht alles gelesen hat. Die Menschen werden von ihrer besten Seite gezeigt, und wenn im „Vorspiel" auch Tiefflieger vorkommen (diesmal deutsche in Frankreich, 1940), die in die Kolonnen Flüchtender hineinschießen, so gehört das eben mit zur Erzählung.

Das Manuskript hat der bekannte englische Esperantist Mason Stuttard sorgfältig durchgesehen, wie der Verfasser mitteilt. Trotzdem, verschiedentlich finden sich sprachliche Eigentümlichkeiten, die auffallen. Morti **de**, suferi **de** malsato — besser je, pro. Imagi **al si** sagte man in der Frühzeit des Esperanto — besser ist einfaches imagi, wie ĝoji, miri. S. 29 letzte Zeile muß es unbedingt sian heißen. S. 31 ist unklar, ob tra oder transveturi la riveregon Yukon gemeint ist. (Warum nicht Jukon?) Letztes Wort auf derselben Seite muß antaŭen heißen. Der 4. Fall bei Personennamen ist teils gekennzeichnet, teils nicht, z. B. S. 56 Z. 3 und S. 84 Z. 11 (einmal mit, einmal ohne Bindestrich). An der Front = **sur** la fronto? S. 77 vicoj **de** ciferoj, nombro **de** viktimoj, legio **de** volontuloj, aber dekoj **da** tiaj savgrupoj und (S. 79) centoj **da** novaj pensoj. Sind die andern Ausdrücke nicht ebensogut Mengebezeichnungen? Auf S. 87 wieder pecoj **de** lardo kaj pano und gleich daneben paketo **da** ĉokolado. Einmal alpistoj, dann wieder alpinistoj. Was gilt? Tio estas certa, kiom ke mi estas Anglo — eine kühne Verkürzung (= kiom estas certa ke). Anglo-amerika oder anglaamerika? Besser letzteres (vgl. germana-Esperanta vortaro, nicht germano-). Homoj fikcias diversajn informojn (S. 24) ist originell und treffend. S. 53. Die betr. Zeitung heißt Moskóvska Pravda, nicht wie auf Seite 3 angegeben. Die schwedische Esperantistin heißt Alamo (nicht -ó) mia Esperantiĝo würde ich nicht sagen (esperantistiĝo), und Schüler würde ich nicht vivanta materialo nennen.

Zum Schluß noch eine wichtige Frage: Heißt sero nicht Blutwasser und serumo Serum? Wenn es sich so verhält, ist in der ganzen ersten Erzählung sero falsch gebraucht. — Statt stafeto hätte ich lieber stafedo, wie planedo, cigaredo, bufedo auch kabaredo.

Die gezeichnete kleine Karte von Alaska ist, da unleserlich, wertlos.

Ich möchte das sauber gedruckte und gut gebundene Büchlein wärmstens empfehlen.

Jfb.

In die Hand *eines jeden Esperantisten gehört das*

Wörterbuch

Esperanto - Deutsch

von Max Butin und Josef Sommer

Die beiden Autoren und Mitarbeiter der Esperanto-Post sind Bürgen für ein einwandfrei zusammengestelltes Wortmaterial. Außer den über 11000 Stichwörtern mit mehr als ebenso vielen Ableitungen enthält das Buch neben den Übersetzungen auch lexikographische Angaben, wodurch es doppelt wertvoll ist. Es wird jedem Esperantisten sehr gute Dienste tun.

Mit dem 30. September ist der Vorbestellpreis abgelaufen. Es kostet 9,- DM zuzüglich 70 Pf für Porto und Verpackung.

Um jedermann die Anschaffung zu erleichtern, liefern wir das Wörterbuch auch weiterhin gegen Teilzahlung.

Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Esperanto-Abteilung

ZUR BELEBUNG DER GRUPPEN-ABENDE

Der lang vermißte und geeignete Lesestoff

12×19 cm, 70 Seiten mit 15 Zeichnungen im Text in schönem zweifarbigem Kartonumschlag.
2,40 DM, zuzüglich 10% für Porto u. Verpackung

Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn

Die Esperanto-Schreibmaschine ist endlich da

Preis 300,— DM.

Wer sie durch unsere Organisation bestellt, erhält einen entsprechenden Rabatt.

Europa-Movado

Geschäftsstelle: Beckum/Westf. Hühlstr. 10.

La Esperanto-Skribmaŝino fine estas havebla

Prezo: 300,— GM.

Mendantoj per nia organizo ricevos konvenan rabaton.

Eŭropo-Movado

Oficejo: Beckum (Hühlstr. 10), Germanio.

das tausendfachbewährte Lehrbuch von Wilhelm und Hans Wingen

80 Seiten Din A5 mit Wörterverzeichnis und Merkblatt für Kursusleiter 2,- DM. Dazu den Schlüssel zu 80 Pf zuzüglich 10% für Porto und Verpackung

Manche Leute *wissen zwar notdürftig,*

was Esperanto ist, doch von den wichtigen Organisationen, insbesondere vom Deutschen Esperanto-Institut, wissen sie oft nur herzlich wenig. Selbst Kursusteilnehmer und Gruppenmitglieder werden von Unterrichtsleitern und Vorsitzenden meist nur mangelhaft hierüber informiert. Daher wird immer wieder gefragt:

Welche Aufgaben erfüllt das Deutsche Esperanto-Institut? Nach welchen Grundsätzen werden die Prüfungen durchgeführt? Handelt es sich um eine Vereinsangelegenheit, oder sind die Prüfungen offiziell?

Welches Wissen wird verlangt bei den Prüfungen „Pri lingva kapableco", „Por kurs-gvidantoj" und „Por instruistoj"?

Wie kann man sich auf eine Prüfung vorbereiten?

Wo werden die Prüfungen durchgeführt?

Wie hoch sind die Prüfungs- und Zeugnisgebühren?

Alle diese Fragen und andere werden beantwortet in der neuen Schrift von

Hans Koch, München,
Leiter des Direktoriums des Deutschen Esperanto-Instituts

Das Esperanto-Examen

Preis: 40 + 5 Pf Zustellkosten

ESPERANTO-KURIER (16) Offenbach (Main), Postscheckkonto Ffm. 202 83

Verlag der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

UNIWERSYTECKA KUL